

pola esperantisto

socikultura revuo de
polaj esperantistoj

Jaro 97 • N-ro 2/2003 • ISSN 0032-2431



Polaj antikvaĵoj: preĝejo al sankta Vojteĥo sur krakova Ĉefplaco.

2
2003

Enhavtabelo:

HISTORIE

35 Ĝi renaskiĝis kiel... fenikso el cindroj.

ALIFLANKE

41 Ho mia kor' – Esperanto surstrate!!!

NUNTEMPE

44 Kie finiĝas espero, tie komenciĝas infero.

47 „Ulica Zamenhofs”.

LINGVISTIKA ANGULO

48 La obstinaj radikoj.

LINGVA ANGULETO

50 La artikolo LA.

RELIGIE

52 Animzorgado kiel la katolika E-movado en Pollando (2).

55 Je kio kredis L.L. Zamenhof?

FORUMO

58 Por for-emaj (kaj ne nur).

AKTUALE – EN NIAJ RONDOJ

59 Ago-Tago de Varsovia Vento.

60 Pszczyna, Krakovo (Teatro ARENO).

61 Bielsko-Biala.

63 „Pli proksimen al la mondo”.

64 La Dua Balta Esperanto-Forumo.

La kovrilpaĝo: Polaj antikvaĵoj: preĝejo al sankta Wojteho sur krakova Ĉefplaco. Desegnoj Andrzej Kotpanowicz.

pola esperantisto

socikultura revuo de polaj esperantistoj, aperas 6 fojojn jare

Eldonas: Eldonejo HEJME, <http://www.hejme.e-tools.pl>

Redakcia stabo: Zofia BANET-FORNALOWA, Czesław BARANOWSKI,
Zbigniew GALOR, Andrzej KOŁPANOWICZ, Ilona KOUTNY, Kazimierz
LEJA (ĉefredaktoro), Lidia LIGEŻA, Stanisław MANDRAK, Danuta

ZELIŃSKA kaj multaj kunlaborantoj.

Jarabono pola: 30,00 PLZ pagenda al:

Wydawnictwo HEJME, 41-250 Czeladź, ul. Wąska 21

BRE Bank SA-mBank • 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda al:

UEA-konto: <kazl-s> • FEL-konto: <leja-t>

Jaro 97 • N-ro 2 / 2003 • ISSN 0032-2431

eldonkvanto 200 ekz.

HISTORIE

la rubrikon gvidas Zofia BANET-FORNALOWA

Ĝi renaskiĝis kiel... fenikso el cindroj. „Pola Esperantisto” en la jaroj 1946–1949.

Totalismaj sistemoj kaj kruelegaj militoj ne savis Esperanton. Tamen la idearo, kies portanto estas la lingvo internacia montriĝis pli forta; tiukaŭze post ĉiuj batoj ĝi renaskiĝis por daŭre servi al la homaro.

La germanaj nazioj pro pluraj „pragmatismaj” kialoj elektis Pollandon por tie realigi sian plej fi-celon „solvi la judan problemon”. Sciate, ke

la judoj ligis multe da espero kun homaranisma idearo — kerno de esperantismo. De tio sekvis ilia, relative nombra, envicigo en E-organizaĵojn, kie pluraj el ili distingiĝis per valora, sindona aktivado diverskampa.

Miloj da ili estis murditaj dum holokŭsto inter pli ol 4 milionoj da siaj kunfratoj. Dum tiu terura periodo perdis ankaŭ pluraj kristandevenaj esperantistoj.

La nazioj ne nur murdis homojn; detruadis ankaŭ ties spiritajn atingajojn. Kune kun la homoj pereis en flamoj genio de homa penso — kultura kaj intelekta heredaĵo.

La postmilita E-movado en Pollando, grave fundita, priplorante siajn Pe-reintojn, konsistanta apenaŭ de areto de antaŭmilitaj aktivuloj, tuj kun granda elano ekagis. Somere 1944 Jan Zawada ektroviĝis en la jam liberigita Lublin. Kiel spertulo pri kooperativismo li estis nomumita de ĉi tie ekestinta pola registaro (PKWN) je posteno de Direktoro de Kooperativa Fako. Li senprokraste kontaktis tieajn kaj alilokjan esperantistojn por revivi-

En Pola Esperantisto nro 1 ni publikigis artikolon de Stanisław Karolczyk, en kiu la aŭtoro skize preparolis historion de la revuo ekde ĝia lanĉo en 1906 ĝis la eksplodo de la Dua Mondmilito. Li ankaŭ antaŭanoncas ĝian reaperrigon post ĝi.

Nun ni komencas publikigi poparte historion de Pola Esperantisto en apartaj periodoj ekde 1946 ĝis la nuna refoja revivigo. La revuo estas prezentita surfone de dramaj historiaj eventoj. Estas ĉi-okaze memorigitaj Esperanto-aktivuloj plej meritaj por ĝia aperado kaj idea nivelo.

Ni esperas, ke la legantoj trovos la publikaĵon interesa kaj ke ĝi riĉigos scion pri la Esperanta pasinto en Pollando.

gi la tute estingitan dum la milito Movadon. Kun daŭro de liberigo de ceteraj teritorioj ankaŭ apartaj aktivuloj komencis kolekti fortojn. Ekestis ebleco al pli ĝenerala ekago. La plej konvena urbo por tiu komenco montriĝis nedetruiita Krakovo, krome ja urbo kun forta, antaŭmilita E-movado.

La plej aktivaj montriĝis tie la aktivuloj de antaŭmilita laborista E-grupo „Tagiĝo”: A. Piotrowski, S. Dziwluk, R. Rauczyński kaj ankaŭ el la neŭtrala E-movado: J. Alfus, L. Kuczer. Kunagante ili ligis kontakton kun samideanoj el aliaj lokoj, inter alie el preskaŭ detruita Varsovio kaj interkonsente kun tiu areto fondis tie en marto 1945 la Asocion de Esperantistoj en Pollando (AEP).

La preparlaboroj estis fulmrapide efektivigitaj. Laŭ ĉiuj oficaĵ leĝpostuloj el 1932, la aktivuloj preparis necesan Statuton kaj la 9an de novembro 1945 AEP estis legalizita fare de la Krakova Vojevodio Oficejo, tiamaniere akirante leĝan personecon, kiu ebligis diverskampe aktivi.

Por puŝi aferojn antaŭen nepris re-fondi la asocian organon.

La lasta antaŭmilita n-ro de „Pola Esperantisto” aperis en julio 1939. Por denove starti mankis ĉio: matricoj, porresperantaj preslitteroj, financaj rimedoj kaj ankaŭ la ideo pri kio efektive, se temas pri la enhavo, komenci... Sed malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj, jam en majo 1946 „Pola Esperantisto” startis per la unua postmilita numero.

Tamen, unue okazis io mirinda,

preskaŭ nekredibla! Dank’ al neimagebla iniciato de esperantisto el pionira periodo (li esperantistiĝis en 1904 jaro!), antaŭmilita delegito de UEA kaj poste IEL, advokato Roman Sakowicz (1888–1969) oni komencis la eldonadon de 1-folia monata Bulteno de Pola Esperantista Societo en Varsovio, kvartalo Okęcie (kie tiam li loĝis). La 1a n-ro aperis en septembro 1945. Konservita flaviĝinta folio apenaŭ nun legeblas, tamen profunde kortuŝas la leganton.

La redaktoro komencas ĝin per kvaŭzaŭ prologo s.t. „Jeszcze Polska nie zginęła...” (Ankoraŭ Polujo ne pereis), kaj skribas post ĝi jenon:

„Tiuj vortoj de nia popola himno nun libere sonas en nia Patrujo, post pli ol kvin jaroj de besta germana teroro. Ili diras al la mondo, ke pola popolo, malgraŭ grandaj oferoj komencas novan, esperplenan vivon por bono de ĉiuj ĝiaj regnantoj. Niaj perdoj estas nepri-skribeblaj: sep milionoj da mortigitaj, urboj kaj vilaĝoj ruinigitaj, la havaĵo rabita kaj bruligita. Sed malgraŭ tio ni vivas kaj ni faros nian vivon pli bela, pli libera ol antaŭ milito. Ĉiu el ni faros ĉion por atingi tiun celon... ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita, ĝi estas la voj’ elektita”.

Senbezona estas komento de tiuj kortuŝaj kaj optimismigaj vortoj de homo, kiu ĉirkaŭe vidis ruinaĵojn kaj ĉiupaŝe renkontadis homojn profunde vunditajn, kun cikatroj neniam kuraceblaj...

Valoras tamen atentigi, kion li am-

pleksis en tiun 1-folian bultenon. Post supre cititaj enkondukaj vortoj li enmetas la informon s.t. „Sorto de familio Zamenhof”. En daŭra parto informo titolita: „Niaj mortintoj”. En ili ambaŭ troviĝas informoj ne ĉiam precizaj, kio klariĝas per tio, ke ja tuj post la milito kaj holokaŭsto oni ne ĉiam sciis, kie kaj kiam tiuj krimoj okazis.

Sekvas grava por organizi la Movadon informa parto s.t.: „Kroniko pollanda”. De ĝi oni ekscias, ke „...en suburbo Okęcie estis fondita Pola Esperantista Societo (Prezidanto — s-ano R. Sakowicz, Sekretario — s-ano M. Kaus), kiu eldonas tiun ĉi bultenon”. Ankaŭ, ke en majo Sakowicz aŭdigis sukcese propagandan prelegon en Societo de Socialista Junularo (TUR).

Sube troviĝas informo pri fondiĝo de la asocioj: en Krakovo — Societo Esperantista sub prezidanteco de A. Piotrowski, en Łódź — s-ano B. Monkiewicz organizis grupon de malnovaj esperantistoj. J. Zawada ĉeestis la unuan kunsidon de tiu grupo okazinta la 9an de majo.

Post tio troviĝas „Kroniko alilanda” en kiu oni sciigas, ke malgraŭ la milito la Movado ne mortis. Ĉi loke oni citas, kio okazis tiutempe en kelkaj landoj. Daŭrigante, oni informas pri la stato de Internacia Esperanto-Ligo (IEL), ĉeokaze esprimante bedaŭron pro morto de la delegito de IEL por Pollando inĝ. M. Chmieliński. La redaktoro R. Sakowicz anoncas, ke li peros inter interesitoj kontakton pri aliĝo al ĉi organizaĵo de pollandaj samideanoj.

Sekvas neatendita, pro cirkonstancoj en ruinigita Varsovio, informo ke: „...*Nia bulteno povis aperi dank’ al bonvola helpo de la Magistrato de la suburbo varsovia — Okęcie*”. La redaktoro petas sendi dankojn al ĝi.

Kaj anonco... ke redaktoro bezonas vortarojn angla- franca- kaj germana-esperantajn!

La redaktoro petas turni sin pri ĉiuj aferoj ligitaj al la Movado kaj bulteno al lia privata adreso, kie troviĝis la redaktejo: Varsovio, Okęcie, Asnyka 4.

La sekvaj n-roj estas aranĝitaj samorde kaj enhavas gravajn por la renaskiĝanta organiza E-vivo informojn. En oktobra Bulteno troviĝas priskribo de vizito de la redaktoro ĉe bofilino de dro Zamenhof — dr-ino Wanda Zamenhof, kiu kune kun sia filo saviĝis. Ŝi petas ĝustigi la informon pri perejo de Zofia kaj Lidia — fratinoj de ŝia edzo, ĉar ŝi ne havas konfirmon pri ilia perejo. Evidente ŝi ankoraŭ havis esperon... Same pri ŝia edzo. (Mi komentas ĉi viziton kaj esperon, iluziojn, kiujn tiutempe konservis kaj kulturis dr-ino Wanda Zamenhof pri siaj proksimuloj, en mia libro „La familio Zamenhof” en la ĉapitro dediĉita al ŝi — p. 52-52).

Aperis ankoraŭ kelkaj numeroj de tiu eksterordinara Bulteno. Mi sentis, ke nepras rememorigi tiun preskaŭ heroan, sur ruinoj faritan laboron de nia pionira samideano, kaj de diverslokkaj liaj sekvantoj.

Fine, post preskaŭ 7-jara paŭzo estis relanĉita „Pola Esperantisto” kiel

monata organo de la Asocio de Esperantistoj en Pollando. La unua numero aperis en majo 1946, en formato 14,5 x 21 cm. La estraro de AEP troviĝis tiam en Krakovo, same do la redaktejo. La revuon redaktis la Komitato. Adreso: Kraków, Rynek Główny 34. Ĝis la fino de la jaro 1946 aperis 5 numeroj. Ili estis parte polaj, parte esperantlingvaj.

Kaj kion oni povas diri pri la enhavo de la unua numero? Komence pollingve, sub titolo „Przełom” (Turnopunkto) estas surfone de ĵus finita Dua Mondmilito prezentita opinio pri neceso de internacia lingvo por pli bona estonto, kaj ĉi-rilate granda utilo, kiun povas alporti Esperanto. La artikolon verkis Bolesław Czechowski, konata en intermilita periodo laborista E-aktivulo, tre merita por la Movado en Pollando.

Sekvas esperantlingva artikolo „Anstataŭ Programo”, en kiu resume oni skizis, kion devas enhavi la revuo por helpi realigi aferojn nepre realigeblajn, por revivigi la Movadon. Oni atendas subtenon de ĉiuj esperantistoj ankaŭ eksterlandaj, kiujn la milito ne tiom kruele spertigis. La artikolo finiĝas per alvoko: „Ni ja laboras por komuna ideo”, kaj subskribo: La eldonanto de „P.E.”.

Sekvas grava anonco pri X Pollanda Kongreso de Esperanto okazonta la 9–10 de junio 1946. Kaj daŭre komunikoj de AEP, subskribitaj de ĝen. sekretario L. Kuczer kaj prez. J. Alfus.

Post tio troviĝas artikolo pri profesoro Odo Bujwid, kiu forpasis en Kra-

kovo la 26an de decembro 1942. Sekvas artikolo de J. Zawada: „Demokratizo de Pollando” en kiu li prezentas esperojn pri la nova, renaskita Pollando.

Prezento pri la okazintaĵoj poresperantaj en Pollando troviĝas en fakko „Koncize pri nia agado”, kaj informoj el la mondo en pollingva artikolo „Usona socio kaj problemoj de lingvo internacia”. Informoj pri Esperanto en kelkaj landoj estas ankaŭ pollingvaj. Ŝajnas, ke aperigo de artikoloj en la pola celis per interesaj informoj allogi al la Movado novajn adeptojn.

Sekvas informoj pri niaj perdoj dummilitaj s.t.: „Ciferoj kiuj instruas...”, kaj ligiĝinta kun la antaŭa trista rubriko: „Memore al Tiuj kiuj foriris”. Oni citas kelkajn nomojn de pereintoj. Ne ĉiuj estas precizaj, sed tiutempe mankis pli precizaj donitaĵoj.

La numeron finas artikolo de A. Piotrowski: „El kultura vivo de Pollando” kaj de mag. Stanisław Hreczuch: „Skoltaro en postmilita Pollando”. Krome troviĝas komunikoj pri fondiĝo de Sekcio de Laboristoj Esperantistaj, gvidata de B. Czechowski, kiu estas ankaŭ la SAT-peranto. Lastpaĝe ni trovas la proponon de AEP aĉeti kelkajn librojn, kaj la informon pri la kondiĉoj de abono de „Pola Esperantisto”.

Ĝis la fino de la jaro PE havis pli malpli similan enhavordon. Ĝi estis vere varia kaj riĉenhava. Malgraŭ malfacilaĵoj ĝi provis ĉiuforte kuraĝigi esperantistojn.

Entute en Krakovo la aktivularo aperigis 5 numerojn de postmilita

„Pola Esperantisto”. El inter ili nepras aparte menci la n–ron 2–3, junio–julio 1946, entute esperantlingvan, ĉar ĝi en sia grandparto estis dediĉita al la unua postmilita Kongreso de Esperanto en Lodzo, okazinta la 9–10an de junio 1946. Ĝi formis tutcerte grandan travivaĵon por ĉiuj, kiuj saviĝis de antaŭnelonge finita milito. Inter la partoprenintoj ektroviĝis dr–ino Wanda Zamenhof kun la filo Ludoviko, kiuj eskapis el destinita al ili morto... La ĉeforganizanto de tiu neforgesebla kongreso estis B. Monkiewicz, tiama prezidanto de lodza AEP.

Bedaŭrinde, post la 5a numero sekvus tutjara interrompo en aperado de PE, kaŭzita de manko da financaj rimedoj. La estraro de AEP dezirante iusence rekompenci al siaj legantoj tiun ĉi mankon, sendis anstataŭe broŝuron de d–ro J. Muszyński pri la historio de ligvoj internaciaj, eldonitan de lodza filio de AEP, kaj propran broŝuron „Esperanto” eldonitan de la krakova filio; aldone kompletan de semajna revuo „Spółnota” (Komuneco), enhavanta Esperanto–angulon.

En 1947 la Movado en Varsovio iom plifortiĝis. Tiukaŭze oni decidis establi la estraron de AEP tie. Nature, ankaŭ eldonadi la asocian organon samloke. Gravis argumento, ke en la ĉefurbo oni havos pli facilan aliron al la ŝtataj instancoj.

La revuo daŭre enhavis la samajn rubrikojn kaj la saman formaton. Pro vigliĝo de E–aktivado en kelkaj lokoj ĝi enhavis ĉiam pli da variaj informoj.

Redaktis ĝin la Komitato, sed jam estis nomumita ĉefredaktoro — Jan Zawada. La adreso de la redaktoro estis: Varsovio, Marszałkowska 81 loĝ. 32.

La unua varsovia numero (do la 6a entute) aperis en septembro 1947. Ĝi estis tre grava, ĉar „Kongresa Numero” (temas pri la kongreso en Varsovio). Ĉi numero estis presita propagandcele, tial nur en pola lingvo. En redakcia enkonduka artikolo estis substrekitte, ke la unua varsovia numero aperas en la 60a datreveno de ekesto de Esperanto kaj ĝi koincidas kun la II postmilita kaj entute la XI Tutpola Kongreso de Esperantistoj. En ĝi oni esprimas esperojn pri la estonto de Esperanto en Pollando kaj vaste en la mondo.

Poste estis prezentita riĉa tagordo de la okazonta la 4–5 de oktobro ĉijare kongreso, kiu kiel estis substrekitte okazos „sub Alta Protektoreco de la Prezidanto de Ministroj Civitano Józef Cyrankiewicz” en Domo de Kooperativismo de Pola Respubliko, ĉe str. Kopernika 30. Ĉi loke menciindas, ke la ĉefredaktoro de tiama PE Jan Zawada deĵoris kiel Direktoro de la Ŝtata Konsilio pri Kooperativoj en Ministerio de Fisko, kio gravis, por ke la Movado havu apogon de ŝtataj instancoj). En daŭra parto estis prezentita konsisto de la elektita estraro de la asocio: J. Zawada — prez., K. Sakowicz, I. Drajtwer, W. Majewski, E. Bugajski — tiuj plenumis funkciojn. Krom ili en la estraro ektroviĝis: B. Czechowski, T. Pleśkaczyński, A. Pisarski kaj E. Czelicka — ĉiuj el Varsovio.

El aliaj urboj en konsisto de la estraro ektroviĝis: J. Alfus, A. Piotrowski, L. Kuczer, R. Rauczyński, J. Silhan, s-ino Sowówna, M. Sygnarski el Krakovo, Andrzejczak kaj B. Monkiewicz el Lodzo kaj Lipak el Chorzów. Estis prezentita anakŭ la Revizia Komitato kaj la Redakta Komitato de PE: Alfus, Czechowski, Czubryński, Dratwer, Monkiewicz, Sygnarski kaj Zawada — ĉefredaktoro.

Nur sur la lasta paĝo troviĝas esperantlingva alvoko s.t.: „Esperantistoj el Eksterlando!” Ĝi jenas: „*Helpu al komuna internacia akcio por konstruo de la unua INTERNACIA ESPERANTA HEJMO EN VARSOVIO*”. Laŭ daŭra klarigo ĝi ekestus por memorigo de 60-jara jubileo de ekesto de Esperanto. Informas, ke „nun briko kostas 100 zloty aŭ egalvaloro”. Bedaŭrinde, ĉi iniciato ĝis nun ne realiĝis...

La redakcio petas ankaŭ alsendi „kredite” ĉiujn dum- kaj postmilitajn eldonaĵojn esperantlingvajn (gazetoj, libroj, broŝuroj).

En 1947 estis eldonitaj ankoraŭ du n-roj, 7a kaj 8a. En 1948 la revuo estis daŭre eldonata, sed dum iom da tempo ne presita sed kopiita, evidente pro financaj malfacilaĵoj. La program-linio estis daŭrigita.

Sed jen komencis amasiĝi nigraj nuboj super la Movado, ligitaj kun tuj posta ekesto de la t.n. stalinisma periodo. Kun grandaj malfacilaĵoj estis aranĝita en la tagoj 31 X-1 XI 1948 la XII Polanda Esperanto-Kongreso. Por la sekvaj oni devis atendi ĝis la jaro 1956.

En la nova situacio ankaŭ PE estis minacita. En 1949 ĝi daŭre aperadis sub redakto de d-ro M. Weralski, sed la Redakta Komitato plenumis la paĝojn ĉefe per materialo montranta sukceson de Esperanto en pluraj landoj... La celo estis pruvi, ke ĝi estas vaste bone akceptata, ĉar bezonata. Bedaŭrinde, tiuj ĉi penoj ne multe helpis... Samkiel ne helpis eldonita samjare pollingva propaganda broŝuro plume de Isaj Dratwer s.t. „W poszukiwaniu języka międzynarodowego” (Serĉado de internacia lingvo).

Oni devis denove atendi 8 jarojn ĝis aperos „Pola Esperantisto” en novaj, pli favoraj politike kondiĉoj.

Resumante, nepras substreki, ke la poresperantan laboron, en tio eldonadon de „Pola Esperantisto” en neimageble malfacilaj kondiĉoj de la postmilita periodo oni devas konsideri heroo. Admiron vekas inventemo kaj sindono de la aktivuloj. Neimagebla oferemo. Niaj samideanoj ne nur laboregis, plenidealisme sin engaĝis, sed ankaŭ — malgraŭ sufiĉe mizeraj viv-kondiĉoj — parte la eldonadon de la revuo financis. Sufiĉas enrigardi en la liston de Propaganda Fonduso por tion konstati. Inter la donacintoj troviĝas apud niaj eminentuloj: prof. Tadeusz Kotarbiński, granda poeto Julian Tuwim, samideanoj el diversaj medioj, inter ili laboristoj, kiel ekz. Ryszard Rauczyński, kies nomo sur koncernaj listoj plurfoje ripetiĝas.

Ili, ĝuste tiuj kaŭzis, ke nia Movado renaskiĝis kiel fenikso el cindroj...

Zofia Banet-Fornalowa

la rubrikon gvidas Zbigniew GALOR

Ho mia kor` — Esperanto surstrate!!!

Kiam brulas arboj, ne estas tempo bedaŭri rozojn. Tiu malnova proverbulo venis al mia kapo, kiam post jaroj mi denove prenis en manojn libron de Frank Stocker*. Okupiĝi nun pri esperantista vivo kaj ĝia esplorado ŝajnas io ne deca. Ĉirkaŭe kreskas danĝeraj mondaj konfliktoj. Pligrandiĝas internaj sociaj kontraŭdiroj. Ĉio influas esperantistan medion, esperantistojn.

Aliflanke, kiamaniere ne pensi pri ecoj de esperantistoj laŭ Stocker, se iliaj araj protestoj kontraŭ la milito kontraŭ Irako estas unu el la unuaj en la interreto? Kiel ne pensi pri la Granda Silento de polaj esperantistoj jam la sepan jaron post la demando de Frank Stocker el 1996: *Kiu parolas esperanton?*

Ne multaj estis tiuj, kiujn la demando atingis. Preskaŭ neniu provis ekvidi ligojn inter analizo de la germana E-movado kaj pola E-realeco. Okulfrapas, ke dum tiu ĉi tempo en pola esperantista medio aperis neniu, eĉ la plej modesta provo, priskribi polan esperantistaron. Nur

lia titola demando, iomete aliforme, estis ripetita pere de afiŝegoj en polaj urboj pro iniciato de neesperantistino-aŭtorino de reklamideo: *Ĉu vi parolas esperanton?* Polaj esperantistoj ŝajnis esti forte ŝokitaj pro la reklamakcio, amasa popularigo de la afiŝo. Kelkaj atingis eĉ finvenkan ekstazon: *Ho, mia kor` — lingvo surstrate!!!* Kaj? Kaj nenio pli!

Neniu provis pridemandi Polojn-neesperantistojn pri la evento. Afiŝa demando direktita al Poloj restis sen respondo. Ŝajnis absolute ne grava kaj tio, kiuj poloj parolas esperante, kaj kiaj estas tiuj, kiuj ne parolas tiun lingvon. La Silento venkis.

Kion kovras la Granda Silento de polaj esperantistoj? Sub ĝia kovrilo ni sendube trovos: kaj organizan krizon kun eterna plendo pri manko da mono, kaj seniluziigo de tiuj, kiuj kabeis (antaŭe bone aŭdataj, nun silentas); kaj mankon de novaj, pli junaj membroj, kaj kreadon de novaj E-organizoj; kaj pli kaj pli grandajn ĝeneralajn vivmalfacilaĵojn — kreskantajn senlaborecon kaj mal-

riĉecon, situaciojn kiam ne sufiĉas kaj tempo kaj fortoj por esperantaj okupoj.

Malgraŭ la graveco de tiuj klariĝoj, la esenco de la respondo troviĝas alie. Ĝin malkovri kunlige kun la bildo de esperantistoj, ebligas esplorrezultoj de F. Stocker aplikataj al la pola E-movado.

Informon pri la aktuala nombro de polaj esperantistoj aŭ de membroj de E-organizo oni ne povas uzi. Konvena, objektiva datumo ne ekzistas. Malgraŭ tio eblas antaŭvidi, ke bildo de pola esperantisto kiel apartenanta al E-organizo ne estas nun tiel evidente tipa kiel antaŭe. Ŝajnas, ke kvanto de neorganizitaj esperantistoj en Pollando signife pligrandiĝis.

En la libro de F. Stocker aperas jena socia portreto de la averaĝa (germana) esperantisto: *li estas vira, 49 jaraĝa, trapasis abituron... nun dungito... evangelia, parolas pli ol tri fremdlingvojn kaj lernis Esperanton pro idealismo kaj lingva intereso. Lin karakterizas socie-emancipiĝema valor sinteno, pozitiva sinteno rilate al eksterlandanoj kaj al Eŭropa Komunumo* (p. 127). Kaj kia estas la portreto de averaĝa pola esperantisto? Ĉu oni povas rompi la Silenton? Ĉu NI povas rompi la silenton? Ĉu VI povas rompi la silenton? Jes! Partopreno en la konkurso *Portreto de pola esperantisto* anoncita sube donas tian eblecon.

Interese estus ekkoni ankaŭ —

Esperanto-movado kongruas kun ecoj priskribitaj far Stocker. Ĉu verus konstato, ke ankaŭ en ĝi decidan rolon ludas la *klera burĝaro* kaj *tri ideologiaj tendencoj*? Se la nuntempan polan E-movadon karakterizus alta edukiĝnivelo de esperantistoj, ĉu tio esprimus *socian medilimon*? Tio — laŭ la aŭtoro de esploroj — signifas en E-movado fakton, ke alta eduknivelo *fortimigas* potencialajn membrojn, speciale — laboristojn. *Klera burĝaro* — superanta, opinikreanta — laŭ la datumoj pri la germana medio el la jaro 1992, regas inter diversaj tavoloj de E-movado kiel pensuloj, dungitoj, edukiĝantaj, oficistoj, memstaruloj, dommastrinoj, senlaboruloj, laboristoj, kunhelpantaj familianoj k.a.

Ankaŭ kaze de pola esperantistaro sintenoj al sociaj valoroj estus ligitaj kun *tri ideologiaj tendencoj*. Pere de ili E-movado nutriĝas. Temas pri la laborista movado (tendenco socireformema), kristanisma socidoktrino (tendenco kristana) kaj novaj sociaj movadoj (tendencoj maldekstre-alternativaj). Speco de plej gravaj por membraro valoroj devus decidi, ke ankaŭ la pola E-movado starus *flanke de progresemaĵaj ideoj*, estante pli favora al eksterlandanoj kaj al Eŭropa Komunumo ol la loĝantaro kiel tuto. Ĉu tia bildo de pola E-movado ne estus tro progresiva? Eble la rolo de kristana socidoktrino sin prezentus kiel pli forta ol en la germana E-movado? Kiaj ni

estas, polaj esperantistoj?

Jen — laŭ esploroj — 82% de la (germana) membraro komprenas E-movadajn celojn kiel idealismajn. Pri signifo de tiu ĉi eco ankaŭ inter polaj esperantistoj oni ne havas kaŭzojn dubi. Ĝi permesas fin respondi nian ĉefan demandon pri la kaŭzo de la Granda Silento. La neekzisto de iu ajn scienca analizo dum la lastaj jaroj kovrus simplan, nudan fakton, ke nenia scienca scio pri (ne nur pola) E-movado estas al esperantistoj efektive bezonata. Altedukita espe-

rantistaro en rilato al si mem perdas racian aliron. Droniĝas en idealisma pensado pere de sentoj. Tiu fenomeno sur fono de movadaj krizoj kaj malfacilaĵoj ŝajnus aldone argumenti verecon de la komenca proverbo. Tamen, aliflanke... Se eliri surstrate estas simbola esprimo de malfermiteco de esperantistoj, tiam apartenas al tio ankaŭ malfermiteco al scienca kono pri ili mem. Do, malgraŭ tio, ke brulas arbaroj ni ne ĉesu akvumiajn rozojn.

Zbigniew Galor

* **Frank Stocker, Kiu parolas Esperanton? Analizo de la Esperanto-movado en Germanio laŭ soci-demografiaj, soci-politikaj, soci-kulturaj aspektoj.** Lingvoplanaj studoj 01. München — Newcastle: Lincom Europa, 1996, 154 p., dulingva eldono: germane kaj esperante. **Enhavo:** 1. *Sociologia profilo de la membroj de GEA*; 2. *Lingvokonoj*; 3. *Esperanto en la vivo de individuo*; 4. *Etika profilo*; 5. *Politikaj demandoj*; 6. *Aŭto, televidilo, ferivojaĝo*; 7. *Rezultoj*; 8. *Apendico*.

La studo de F. Stocker sukcese enskribiĝas en la tre mallongan liston de empiriaj sociologiaj esploroj pri E-movado celantaj prezenti ĝian pli kompleksan sciencon bildon. Komuna por ili estas demando: kiaj specifaj sociaj ecoj karakterizas la esperantistaron? Certajn respondojn ni povis jam legi en *The Esperanto Movement* de P. Forster (1982) kaj en *La rondo familia. Sociologiaj esploroj en Esperantio* de N. Rašič (1994) [el la recenzo de Zbigniew Galor: *Rigardo en sociologian spegulon*, Esperanto, 1999, n-ro 1 (1110), p. 13.]

Ni anoncas konkurson:

KARAKTERIZO DE POLA ESPERANTISTO

Kia estas nuntempa pola esperantisto? Plej interesajn karakterizojn ni publikigos en la revuo. Ĉirkaŭ unupaĝan priskribon bonvolu sendi al la adreso de la redakcio poŝte aŭ rete.

Kie finiĝas espero, tie komenciĝas infero

Interparolo kun red. Roman Dobrzyński

Gratulon pro la libro „Ulica Zamenhofa”. Mi tralegis ĝin „unuspire”.

Dankon pro la komplimento. Per la sama vorto esprimis sian opinion multaj legintoj, ne nur esperantistoj. Tio estas surprizo por mi des pli agrabla, ĉar fakte nur dum la verkado mi komprenis, kiel komplikan temon mi kuraĝis affronti.

Tamen ŝajnas, ke vi verkis la libron tre rapide.

Male. El ok libroj, kiujn mi publikigis en la pola lingvo, „Ulica Zamenhofa” evidentiĝis la plej malfacila kaj temporaba. Ĝi kostis min dek jarojn da laboro. Se ĝi ŝajnas rapide skribita, tio paradokse respegulas la „penon de kreado”. Ĉu verkante tekstojn, ĉu farante filmojn, mi ĉiam klopodas „duopiĝi”. Mi ne skribas por iu abstrakta leganto, sed por mi mem kiel leganto. Kiam mi faras filmon, mi same imagas min mem antaŭ televidilo kiel spektanton.

Tamen ĉifoje via verkado devis esti pli facila. Vi notis eldirojn de via in-

terparolanto, sinjoro Ludoviko Zaleski-Zamenhof, la nepo de la kreinto de Esperanto.

Efektive, „Ulica Zamenhofa” estas „intervju-rivero”. Ĝuste tia formulo de la libro instigis min akcepti la proponon verki ĝin. Se mi kiel Dobrzyński skribus libron pri Esperanto aŭ Zamenhof, ĝi estus unu plia ĉitema publikaĵo inter multaj aliaj. Tamen verki libron, kies heroo estas ne nur objekto, sed ankaŭ subjekto, ŝajnis al mi interesa defio. Cetere allogis min eksterordinara personeco de doktoro Zaleski-Zamenhof. En la movado oni konas lin kiel la „nepon” de Zamenhof, dum li mem estas la alia eminenta Zamenhof. Li — internacie konata konstruisto, kreinto de „artefaritaj insuloj”, profesoro de altlernejoj en diversaj landoj de la mondo — estas samtempe ĉarma kaj humorplena persono. La intervjuo formulo de la libro donis al mi la ŝancon verki ĝin tiamaniere, ke seriozaj kaj malfacilaj temoj

fariĝu legindaj.

Noto sur la titolpaĝo informas, ke la libro estis verkita surbaze de interparoloj kun doktoro L.C. Zaleski-Zamenhof. Kion ĝi signifas, precize?

Tion, ke „Ulica Zamenhofa” ne estas stenografajo de la interparoloj, nek ĝi enhavas tekstojn reskribitajn de magnetofona bendo, kvankam tiamaniere ni komencis kunlabori. Ĉapitro „La muroj”, kiu koncernas la militan periodon, grandparte enhavas aŭtentikan konversacion. Plue aperis teknikaj problemoj. Sinjoro Zaleski-Zamenhof loĝas en Parizo, mi en Varsovio. Ni renkontiĝis relative ofte, tamen ne sufiĉe. Fine ni ellaboris nian propran „teknologion”. Unue ni interkonsentis, ofte per telefono, pri konkretaj temoj, faktoj kaj ilia interpreto. Sekve mi verkis „projekton” de konkreta interparolo kaj sendis ĝin al doktoro Zaleski-Zamenhof, kiu modifis ĝian enhavon kaj formon ĝis tiam, kiam li povis aprobi ĝin kiel sian propran. Mi emfazis, ke profesoro Zaleski Zamenhof modele regas la polan lingvon, lia stilo estas eleganta kaj preciza. Adam Mickiewicz, la patrono de lia varsovia gimnazio, povus fieri pri li.

Ĉu teksto foje aprobita de via interparolanto, fariĝis preta por publikigo?

Ne ankoraŭ. Sekvis fazo de reciproka konvinkado, ĉar mi ne ĉiam povis konsenti pri ŝanĝoj aŭ forstrekoj. Ofte la verkado stagnis, ĉar ni ne sukcesis interkonpreniĝi. Sed

tio ne signifas, ke ni kverelis. Tute ne! Profesoro Zaleski-Zamenhof estas homo de alta kulturo, li ne altrudis siajn opiniojn, preferis flankenlasi kontraŭstarajn pensojn, por ke ili trankvile maturiĝu. Nu, mia rolo estis malfacila, ĉar la intervjuo formulo permesis al mi enmeti nenion, kio ne pleĉaus al la interparolanto. Iom post iom ni ĉiam sukcesis ellabori vortumojn akcepteblajn por ambaŭ. Rezulte la libro, kiun fakte mi verkis, entenas neniun frazon, kiun profesoro Zaleski-Zamenhof ne aprobis antaŭ la publikigo.

Kial vi titolis la libron „La Zamenhof-strato”?

La titolo koncernas la straton, laŭ kiu pasis 300 mil varsoviaj judoj al trajnoj forirantaj al la ekstermejo Treblinka. Estis tragika koincido, ke la saman vojon iris posteuloj de la stratpatrono, interalie lia nepo Ludoviko, kiu mirakle saviĝis. Pri tiu evento estis publikigitaj diversaj misinformoj. Mia granda ŝanco estis ekscii la veron pri militaj travivaĵoj de la familio Zamenhof kaj tion mi sukcesis. Krome la titolpaĝa strato prezentas simbolon, kiun oni povas esprimi per demando: „Laŭ kiu vojo plu iros la mondo?” Doktoro Zaleski-Zamenhof nepre deziris, ke en la libro estu starigita tiu ĉi demando. Ni provis respondi ĝin en la lasta ĉapitro „La pontoj”. La teruraj travivaĵoj de la nepo rezultis el la fakto, ke la idealoj de la avo estis malrespektitaj.

Kiun koncernas la libro: la avon, ĉu la nepon?

Verdire la unua ideo estis verki libron pri doktoro Ludoviko Zaleski-Zamenhof, kies travivaĵoj sufiĉus por skribi kelkajn biografiojn. Tamen ne estis malfacile rimarki la supre menciitan integran rilaton inter la vivo de la nepo kaj tiu de la avo. Mi insistis enmeti ĉapitrojn pri la kreinto de Esperanto pro kelkaj kialoj. Post tralego de verŝajne ĉiuj biografioj de Ludoviko Zamenhof mi konstatis, ke kelkaj el ili estas verkitaj tendence aŭ sen sufiĉa orientiĝo pri komplika historio de la mondoparto, en kiu naskiĝis kaj vivis doktoro Esperanto. Lia nepo naskiĝinta kaj edukita samloke, kaj mem estante Zamenhof, tutcerte povas kontribui al pliprofundigo de scio pri la kreinto de Esperanto. Tiel mi pensis. Doktoro Zaleski-Zamenhof konsentis post longa hezito kaj li bone faris, ĉar dum interparoloj ni proponis novan interpreton de kelkaj faktoj.

Ekzemple?

Ekzemple oni rutine konsideras homaranismon „religia mistikismo” de Zamenhof, dum ĝi entenas evidente la ideon pri homaj rajtoj, kiujn nur post multaj jaroj estis formulitaj nur en la Ĉarto de UNO. Cetero Zamenhof antaŭdiris la Eŭropan Union kaj ĝian Tribunalon de Justeco, kvankam ne sciis, ke la sidejoj de tiuj institucioj troviĝos respektive en Bruselo kaj Strasburgo.

Ĉu nur pro tio vi enmetis ĉapitrojn

„La turoj” kaj „La vojoj”?

Verdire mi volis elprofiti la okazon por propagandi pri Esperanto. Jam delonge ne aperis pollingve seriozaj publikajoj pri la lingvo internacia, nek pri ĝia kreinto. Laŭ propaganda vidpunkto „Ulica Zamenhofs” tutcerte plenumis sian rolon. Doktoro Zaleski-Zamenhof estis trifoje intrvjuita de la Pola Televido. En la semajnrevuo „Przegląd” aperis longa intervjuo kun li. Mi mem parolis plurfoje pri la libro en la televido kaj la radio. Krome, surbaze de la libro aperis artikoloj en diversaj gazetoj. Tre ampleksan kaj profundan recenzon aperigis la plej granda pollingva ĵurnalo en Usono „Dziennik Związkowy”.

Tamen ne estis facile aĉeti la libron. Kial?

Pri tiu temo bonvolu intervui direktoron de la Eldonejo „Kleks”. Profitante la okazon, mi ŝatus emfazi ankoraŭ unu propagandan aspekton de la libro. Dum la verkado spontane naskiĝis kelkaj ideoj, kiujn ni ambaŭ poste provis realigi. La plej interesa estis la „Medalo de Toleremo”. Kiam ni parolis pri la unua Esperanto-Kongreso, dum kiu oni malpermesis al Zamenhof deklami la lastan strofon de la poemo „La preĝo sub la verda standardo”, ni subite konstatis, ke ekzakte la samajn vortojn proklamas la papo Johano Paŭlo la Dua. Rezulte la Zamenhof-Fondumo en Bjalistoko kune kun lokaj aŭtoritatoj projektis kaj realigis la medalon. Du

jarojn daŭris proceduro por ricevi konsenton de la papo kaj fiksi lokon, kie la medalo estos transdonita al la Sankta Patro. Doktoro Zaleski-Zamenhof persone enmanigis la medalon al la papo en Drohiczyn la 10an de junio 2000.

Ĉu la libro estos esperantigita?

Jam mi finis traduki ĝin. Fakte temas ne pri la traduko, sed pri la reverko en Esperanto. Estas fari-taj multaj ŝanĝoj, dank' al kiuj la libro estos pli facile digestebla por internacia leganto. Krome ĝi estas jam tradukata en la litovan kaj la portugalan lingvojn. La Esperantan varianton skrupule reviziis doktoro Ulrich Lins, eminenta historiisto kaj perfekta esperantisto.

Kion li opinias?


Eble nur pro ĝentileco li diris, ke „La Zamenhof-strato” estos „furorlibro”.

Mi pensas same, kaj tute ne pro ĝentileco. Dankon pro la intervjuo.

intervjuis: Kazimierz Leja

Roman Dobrzyński, *Ulica Zamenhofa*, Wydawnictwo KLEKS, Biel-sko-Biała 2001, p. 287, 195x125.

La libro praktike neatingebla pro nekonata kialo. La kovrilo originale nigra.



„Ulica Zamenhofa”

Ĵus mi tralegis la libron *Ulica Zamenhofa*, hazarde aĉetitan de unu esperantisto. Mia unua impresio estis, ke la titolo ne estas tro... feliĉa. Libro pri la strato? Kion oni povas skribi pri strato? Pri Zamenhof jes, sed pri la *Strato Zamenhof*? Malgraŭ ĉio la libron mi aĉetis.

Veninte hejmen mi komencis la legadon, kaj tuj mi konstatis, ke la enhavo rilatas kaj al Esperanto, kaj al du famaj personoj: la avo kaj la nepo Zamenhof, al ilia vivo kaj travivaĵoj. Eĉ por homoj ne interesiĝantaj pri Esperanto la libro povas esti interesa dank' al abundaj informoj pri la varsovia geto (judkvartalo) kaj pri homoj, kiuj travivis tiun kruelan historian periodon persone.

Mi ne povas diri, ke la libron mi tralegis dum unu nokto; tio estus por mi tro laciga, kaj mi kutimas trankvile pripensi la aferojn, pri kiuj mi legas. Tamen la libro okazis por mi tiel interesa, ke mi ne povis deŝiri min de legado; mi ne povis okupiĝi pri io alia, antaŭ ol mi ĝin tralegos ĝis lasta paĝo. Mi riĉigis mian scion pri diversaj aferoj ligitaj kun Esperanto kaj esperanta medio.

Oni povas nur bedaŭri, ke tiun ĉi libron povas tralegi nur poloj — ĝi valoras tradukon al Esperanto.

Władysław Burszta

la rubrikon gvidas Ilona KOUTNY

La obstinaj radikoj

Esperanto estas logika lingvo — ni diras: se ni lernis la gramatikajn regulojn, tiam ni ĉiam povas ilin apliki. *Sana-malsana*, *laŭta-mallaŭta*, ktp., ĉar *mal* ĉiam esprimas kontraŭecon; *manĝi-manĝilo*, *veturi-veturilo*, ktp., ĉar *il* esprimas instrumenton, per kiu la agado efektiviĝas.

Kial do la malobeema *broso* kaj ne *brosilo* simile al *kombilo*, kial *martelo* kaj ne *martelilo* simile al *hakilo*? La respondo sonas: *bros* kaj *martel* estas substantivaj radikoj, kaj *komb* kaj *hak* estas verbaj. Eblas

Esperanto estas tiom regula kaj tamen tiom fleksebla, ke diversaj aliroj kaj uzoj eblas. Zamenhof genie elpensis la regulan lingvan sistemon, sed ne donis por ĉio detalan preskribon (ekzemple por intonacio mankas reguloj). Aliflanke esperanto evoluas, ankaŭ ĝiaj uzantoj kontribuas al ĝia nuna bildo. Malkaŝiĝis diskutebaj kaj diskutendaj terenoj. La lingvistika angulo regule plukos el tiu ĉi kampo.

daŭrigi la vicon per la adjektivaj radikoj kiel *grand* kaj *bel*. Por la **radik-karaktero** pledis jam René de Saussure, poste Kolomano Kalocsay kaj Gaston Waringhien (vidu la ĉapitron pri tio en *Plena Analiza Gramatiko*) kaj la Akademio eĉ fiksas tion en siaj Aktoj (1967).

Aliflanke la vortiĝo de ideoj en diversaj vortospecoj estas specialaĵo de la unuopaj lingvoj. Ekzemple, se temas pri trinkemo, la angla diras *I am thirsty* ‘mi estas trinkema’, la franca *J'ai soif* ‘mi havas trinkemon’ kaj la pola uzas la verban esprimon *Chce mi się pić* ‘mi volas trinki’ aŭ ‘mi trinkemas’. En Esperanto eblas ĉiuj formoj, kiel ni vidas el la tradukoj. La vortigaj finaĵoj servas por esprimi verbon, substantivon kaj adjektivon: *varmi-varmo-varma* aŭ *trui-truo-trua*. Ĉu nepre la radikoj havas iun bazan karakteron? Troviĝas ne malmultaj radikoj en PIV, kies karakteron oni povus pridubi (kial *kis* kaj *danc* estas verbaj?) Eble tio estas nur demando de pli ofta uzo en iu aŭ lia formo, kion influas ankaŭ la semantika enhavo de la vorto. (Ho, kiel bone estus havi esperantan korpuson,

kie ni povus tion kontroli la oftecon de diversaj formoj!)

Szerdahelyi kontraŭis la bazan karakteron de radikoj, li skribas pri emo de radikoj vortiĝi en iu el la kategorioj, kaj pri la tiel ekestintaj *primaraj vortoj*. Per tiu opinio kontraŭa al la oficiala akademia kaj tiu de Kalocsay li kaŭzis skandalon en la 70aj jaroj. El kvaronjarcenta distanco tio jam ne ŝajnas esti tiom antagonisma. „Karaktero” kaj „emo” estas arbitraj aŭ malfacile kapteblaj. Wacha (1984) provas repacigi la du teoriojn: „*radikkaraktero povus esprimi tian econ de la radiko, ke ĝi — malgraŭ vortiĝoj je diversaj vortkategorioj — kapablas kunporti certan aŭ en certa maniero transformiĝantan valentaron, karakterizantan primare unu el la vortkategorioj*”.

La problemon fakte Zamenhof mem kaŭzis, listigante la radikojn en la *Unua libro* kaj en la *Universala Vortaro* kun alilingvaj vortoj kiel ekvivalentoj. Szerdahelyi tute prave konstatis, ke Zamenhof transprenis ne radikojn, sed vortojn el la fontolingvoj, kaj poste li ekstraktis la radikojn. Li mencias ankaŭ la influon de la rusa lingvo koncerne la signifon de la vortoj malgraŭ ilia novlatina formo. Ekz. broŝ ekzistas sub verba kaj substantiva formoj en la franca (la *brosse* kaj *brosser*), sed la rusa uzas nur la substantivan formon (*щётка*). Laŭ li ne ekzistas morfologia karaktero, sed la signifo de la radikoj enhavas semantikan va-

loron. „*La finaĵo... portas la gramatikan/funkcian informaĵon apud la semantika/leksika informaĵo de la radiko*”.

Do la diferencoj fontas el la malsameco de la fontolingvoj de esperanto. La teorio de la Akademio estas kritikata ankaŭ interne: kelkaj atentigas pri la konfuzo inter sintaksaj kaj semantikaj kategorioj (M. Duc-Goninaz en persona letero al mi, G. Lagrange en letero al la Akademio). La problemo cetere estas pli vasta, ne rilatas nur al vortoj el „malsamkarakteraj” radikoj, sed ankaŭ al tiuj, kiuj devenas el „samkarakteraj” radikoj kiel *fizikisto* kaj *biologo*, *virino* kaj *amazono* aŭ la transitiveco de verboj (*varii* baze netransitiva, sed *ŝanĝiĝi* devenas el la baze transitiva *ŝanĝi*). En tiuj kazoj jam ne helpas la teorio pri radikkarakteroj, temas pri malsama semantika aliro.

Ilona Koutny

Referencoj

- Aktoj de la Akademio 1963–1967. Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto nro 9.* Rotterdam. p. 58–68
- Szerdahelyi István (1976): Vorto kaj vortelemo en esperanto. „*Kultura Centro Esperantista: Studoj 10*”. Kuopio: Librofako de Literatura Foiro.
- Wacha Balázs (1984): Pri la radikkaraktero. En: *Acta Interlinguistica*. Red. R. Rokicki. Prelegaro de la 11a SIS en Varsovio. Varsovio: ACI. p. 95–101

La artikolo LA

Oni ofte substrekas, ke Esperanto estas multajn fojojn pli facila ol ĉiu natura lingvo. Eble pro tiu ĉi facileco multaj lernas ĝin iom supraĵe kaj dum multaj jaroj apartenas al t.n. „eternaj komencantoj”.

Por progresi en la lernado de la lingvo internacia oni devas konstante ion legi kaj skribi, plivastigante tiamaniere sian vortprovizon. Estas konsilinde do, ke ĉiu esperantisto abonu kaj legu almenaŭ unu esperantan gazeton (ekz. *Pola Esperantisto*), korespondu kun 2–3 gesamideanoj kaj kiel eble plej ofte uzadu praktike la lingvon. Bonegajn konsilojn al esperantistoj donis iam red. Andrzej Pettyn, konata aŭtoro de E-lernolibroj:

— Se vi volas ellerni la legokapablon — LEGU!

— Se vi volas ellerni la skribokapablon — SKRIBU!

— Se vi deziras ellerni la parolkapablon — PAROLU!

En la lingva anguleto de *Pola Esperantisto* ni klopodos iompostiome prezenti al vi diversajn gramatikaĵojn, por rememorigi ilin al progresintoj kaj proksimigi al komencantoj, donante ekzemplojn de korekte skribitaj frazoj. Estas sciate, ke multaj esperantistoj havas malfacilaĵojn kun korekta uzado

de difina, senfleksia artikolo *la*. Ĝuste de tiu ĉi problemeto ni komencas nian rubrikon.

Principe oni uzas la artikolon antaŭ substantivoj por montri, ke la priparolata persono aŭ objekto estas jam konata (priparolita, troviĝanta antaŭ ni) aŭ estas reprezentanto de sia klaso (kategorio), aŭ estas sola, unika en sia speco.

Ekz.: 1. Mi legas libron. La libro estas interesa. Donu al mi la panon (mi petas de la edzino, kiam ni sidas ĉe la tablo kaj ambaŭ bone vidas pri kiu pano temas). Sed: Donu al mi panon (mi petas de la vendisto, ĉar temas pri ia ajn pano).

2. La homo havas du manojn (ĉiu homo...). La birdoj havas flugilojn (ĉiuj birdoj...).

Oni elhakis la arbojn apud la vojo (ĉiujn arbojn...), sed: oni elhakis arbojn (ne ĉiujn...). Donu al mi la kafon (la tutan, montratan), sed: Donu al mi kafon (iom da kafo...).

3. Solaj, unikaj en sia speco estas: la suno, la luno, la tero, la ĉielo (do ni uzas *la*).

La filino de nia prezidento ĉarmas (la prezidento havas nur unu filinon).

Se ni skribus: Filino de nia prezidento ĉarmas, tio signifus: unu el la fi-

linoj de nia prezidento.

4. Oni skribas sen artikolo la nomojn de personoj, landoj, urboj, maroj, riveroj kaj montoj. Ekz.: Mi loĝas en Mielno proksime al Koszalin. En Bjalistoko naskiĝis L. Zamenhof.

Se la maro, rivero aŭ monto estas nomataj nur per individuiga, sed komunsignifa adjektivo oni uzas la artikolon. Ekz.: La Ruĝa Maro, la Norda Maro, la Balta Maro, la Blua Rivero, la Monto Blanka (sed: Ĝeneva Lago, Jamno Lago).

5. La nomojn de preskaŭ ĉiuj festoj ni skribas sen artikolo. Ekz.: Pasko, Ĉieliro de Kristo, Pentekosto, Kristnasko (esceptoj: la Pasko, la Pentekosto).

Kiam la festo ne estas nomata per la nomo de okazintaĵo, oni uzas la artikolon:

La tago (festo, dimanĉo) de: la Tri Reĝoj, la Palmaĵoj, la Unua de Majo, la Triunuo, la Kristokorpo, la Mortintoj, la Sankta Johano (oni diras ankaŭ: la Johana tago).

6. La nomoj de tempodividoj ĝenerale ne toleras la artikolon. Ekz.: Majo estas la plej bela monato de la jaro. Hodiaŭ estas sabato. Jam estas vespero (nokto, mateno).

7. La titoloj de societoj skribitaj normale laŭbezone akceptas la arti-

kolon, sed kiam oni signas ilin per komencaj literoj, oni forigas la artikolon. Ekz.: La Universala Esperanto-Asocio estis fondita en 1908 jaro. Mi estas delegito de UEA.

8. La titoloj de la klasikaj verkoj regule alprenas la artikolon (la modernaj —neniam), ekz.: la Odiseado, la Biblio, la Korano, la Nova Testamento.

9. La orientpunktoj estas komunaj nomoj kaj alprenas la artikolon: la oriento, la okcidento, la nordo, la sudo.

10. Oni uzas la artikolon, kiam la propraj nomoj estas akompanataj de epiteto. Ekz.: Kazimiro la granda, Johano Paŭlo la dua, la bona Dio, la tuta Pollando.

11. Artikolo **la** servas ankaŭ kiel simpla gramatika ilo en jenaj frazoj:

Hodiaŭ estas la 8a de marto. Ŝi estas la plej bela el ĉiuj lernantinoj. Jen la pli forta el la manoj. Tiu ĉi libro estas la mia. **La** estas uzata ankaŭ en la frazoj: La rivero Odero. La prezidento Wałęsa. La monto Everesto. La principino Diana.

Vi vidas do, ke la artikolo **la** estas necesa, por la klareco kaj precizeco de la esprimoj. Ĝi ne estas superflua balasto!

Czesław Baranowski



Animzorgado kiel la katolika E-movado en Pollando

(dua parto)

La jaro 1973a estis malgaja por la katolikaj esperantistoj, ĉar la PEA nuligis la PKUE-on en kadroj de *la ideologia purigado* de ĉiuj organizacioj. Ekde tiu tempo la katolikaj esperantistoj ne plu povis publike konfesadi sian kredon en la pola esperantujo. Tio tamen havis ankaŭ pozitivan efektan, ĉar elĵetita el la PEA *papisto*, pastro J. Zielonka el Tarnów, fondis la esperantistan sekcion katólikan ene de la Klubejo de Katolikaj Inteligentuloj (ES-KIK) en Krakovo. Je la inaŭgura kunveno alvenis episkopo Ladislavo Miziołek el Varsovio, kiu interkonsente kun la dioceza episkopo el Tarnów Georgo Ablewicz agnoskis la sekcian komenco de la animzorgado por esperantistoj en Pollando kaj pastron J. Zielonka nomumis la landa animzorganto.

Poste aliaj urboj imitis Krakovon kaj fondis proprajn animzorgadojn. En la sekvaj jaroj estis jam multaj internaciaj rekolektoj, pilgrimoj kaj katolikaj renkontiĝoj en: Gostyń, Bardo Śląskie, Niepokalanów, Góra św. Anny, Wrocław kaj aliaj lokoj de Pollando. La 2an de majo en 1984 jaro Plena Konferenco de la Pola Epi-

skoparo oficiale aprobis la agadon kaj la landan amimzorgadon kun sidejo en Tarnów.

Nune polaj misiistoj esperantistaj laboras en Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Zambio, Madagaskaro kaj Kazahstano. El Pollando ili ricevadas materian kaj spiritan helpon. Tiel Esperanto faciligas al ili restadon for de la Patrujo.

La monda agado de IKUE ne pretervidas ankaŭ Pollandon. Inter la 17a kaj 21a de aŭgusto 1977 jaro sur la Hela Monto havis lokon la 27a IKUE-Kongreso. Ties alta protektanto estis Kardinalo Karlo Wojtyła, la nuna Papo Johano Paŭlo la II. Li do en la kongreslibro skribis la jenajn vortojn: *Patro Sankta, konservu en Via nomo tiujn, kiujn Vi donis al Mi, por ke ili estu unu kiel Ni (Joh 17,11). Kiel Kristo Jesuo preĝis pro siaj disĉiploj pri la unueco, same ankaŭ mi, en nomo de la Eklezio, preĝas por vi. Unu kredo kaj la sama amo helpu al vi unuigi la disbatitan mondon en unu ŝafaron kaj sub unu Paŝtisto. Unu supernacia lingvo — Esperanto ankaŭ efike servu al tiu nobla celo. En mia nomo kaj en nomo*

de multaj favoraj al vi polaj episkopoj mi benas vian agadon kaj deziras al vi la Dian gracon (subskribis Ks. Kardynał Karol Wojtyła). Domaĝe, ke ne ĉiuj polaj esperantistoj katolikaj imitas la Papon kaj strebas pri la unueco de la movado.

En la jaro 1975 Dia servanto kardinalo Stefano Wyszyński en intervjuo al pastro Duilio Magnani diris profetajn vortojn: *Dum la Dua Vatikana Koncilio la lingvo latina montris sian fiaskon... Pro tio la sekva koncilio devos uzi Esperanton* (Radio Vaticana 10/175, p. 13).

Post la dek jaroj esperantistoj el la tuta mondo denove alvenis al Ĉenstoŭovo, en la tagoj inter 20a ĝis 24a de junio 1987 j. Estis jam la 41a Kongreso de IKUE, kies ĉefa temo estis *Unuiĝo ĉirkaŭ la Eŭkaristio helpe de Maria*. Post la Kongreso plimulto de la partoprenantoj forveturis al Varsovio al la 72a Universala Kongreso (la laika 25 VII–1 VIII) je kiu alvenis pli ol 6000 da delegitoj el la tuta mondo.

La Kongreso tamen ne estis agrabla por la katolikoj. Malgraŭ ĉiuj interkonsentoj, eĉtio, keepiskopo Miziołek apartenis al la Honora Komitato, komunistoj ruze forstrekis el la programo ĉiujn menciojn pri la katolikoj, bojkotis ĉiujn aranĝojn, kvankam aliaj religioj estis favorataj.

Malgraŭ malamikeco de la kongresorganizantoj la katolikoj aranĝis en apuda preĝejo de Ĉiuj Sanktuloj la animzorgadon kaj ĉiutagan sank-

tan Meson en Esperanto kuncelebritan de multaj pastroj el diversaj landoj; dimanĉe en la porpastra Seminario ĉe Krakowskie Przedmieście. Speciale ni travivis sanktan Meson kuncelebritan de dekoj da pastroj kaj sub gvido de episkopo Ladislavo Miziołek en preĝejo al sankta Stanislavo Kostka. Post la Meso estis pilgrimo al tombo de la diservanto Georgo Popiełuszko kaj filmo pri lia vivo kaj morto. Ĉi tie ni travivis la veran unuiĝon de la Eklezio: *unu Dio, unu kredo kaj unu lingvo inter diversaj nacioj de la mondo*.

Krom la centra Kongreso en Varsovio okazis ankaŭ la partikularaj de: fervojistoj en Katowice, kuracistoj kaj junularo en Krakovo kaj aliaj. Speciale oni devas distingi la Universalan Kongreson de la Nevidantaj Esperantistoj, al kiuj celebris sanktan Meson kaj predikis episkopo Ladislavo Miziołek la 2an de aŭgusto 1967 j. en preĝejo al sankta Katarina en Ursynów. Ili ankaŭ havas siajn mes- kaj kant- librojn en Esperanto presitajn en sistemo de Braille.

La renkontiĝoj estis larĝe komentitaj de Radio Vatikana, kiu ekde la 2a de januaro 1977 j. emisias siajn disaŭdigojn ankaŭ en Esperanto dimanĉe, merkrede kaj ĵaŭde je la horo 21,20 de MET (20,20 UTC).

La jaro 1990 estis tre agrabla por la katolikaj esperantistoj, ĉar la Internacia Komisiono Liturgia sub gvido de Episkopo Ladislavo Miziołek finpreparis novan tradukon de la

Meslibro kaj la Apostola Sidejo aprobis ĝin (2 III kaj 8 XI 1990) por uzado en la tuta Eklezio. Ĝis tiu tempo nur la pola animzorgado havis tian permeson celebri esperantligve — laŭbezone. Tiu aprobo donis al la E-movado, ĉefe por IKUE, novan impulson por la agado.

La esperantista agado animzorga en la sekva, la 1991 jaro estis tre riĉa. Krom la normalaj pilgrimoj, spiritaj ekzercoj kaj preĝtagoj ni havis du grandajn internaciajn kunvenojn kun Papo Johano Paŭlo la II. La unua estis en Rzeszów, al kiu esperantistoj pilgrimis post siaj spiritaj ekzercoj en Niechorze la 2an de junio 1991; kaj la dua havis lokon en Ĉenstoĥovo la 15an de aŭgusto 1991, kien pilgrimis esperantistoj el diversaj landoj je la VI Monda Tago de Junularo. La ĝojo eksplodis, kiam la Papo, je peto de la landa animzorganto, dufoje ekparolis al esperantistoj en la internacia ligvo. Ekde tiu tempo la Papo du foje en la jaro salutas la mondon en Esperanto: dum la beno *urbi et orbi* okaze de Kristnasko kaj Pasko.

Nune nia movado travivas krizon, ĉar al kelkaj postkomunistoj el nia lando ne plaĉas la eklezia jurisdikcio kaj esperante ricevi subvencion de la ŝtato, la 22an de junio 1996 fondis en Krakovo apartan organizaĵon. El la IKUE, kiu estas la katolika kaj registrita en Vatikano, ili faris novan sektion kaj registris ĝin en varsovia juĝejo kontraŭ la *Jus kanonika*

(kanonoj 116 kaj 117) kaj kontraŭ la Konkordato (§ 4) kiel la sektion laikan — malgraŭ admono kaj protesto de la Episkoparo. Ĉar kion signifas la Eklezio, se la ateistoj pagas? — Profito je ĉiu prezo! Je prezo de rezigno el la katolikeco!

Ĝenerale tamen tio ne havas tiel teruran efekton, ĉar krom la organizacio, ekzistas ankaŭ la animzorgado, kiu funkcias normale ene de la katolika Eklezio.

Estas vere ĝojige, ke nune Pola Esperanto-Asocio kaj la Animzorgado de Esperantistoj kunlaboras harmonie. La Estraro de PEA faras nenian baron por la religia agado; eĉ pli, ĉar ofte invitas la animzorganton je siaj Kongresoj kaj reciproke la Estraranoj aperas dum la Diservoj. Ĉiuj estas same bonvenaj kaj kontentaj.

En la pasinta 2002 jaro estis pluraj konkorde aranĝitaj kunvenoj: kristnaskaj, paskaj kaj pilgrimaj. La plej gravaj estis Printempo en Pelplin 27–28 IV, Renkontiĝo kun la naturo en Krzeszowice 25–26 V, la Jubilea Kongreso de Esperantistoj en Sosnowiec 28–30 VI, la 55a Kongreso de IKUE en Kromeřiš 20–27 VII, la 30aj preĝtagoj en Ĉenstoĥovo 19–20 X, GRUPE en Glivice 8–11 XI, kaj la XX Tagoj de Krakovo 12–15 XII 2002.

Ĉiuj menciitaj aranĝoj postlasis en mia animo tre agrablajn travivaĵojn, ĉar estas aranĝitaj en vere esperantista etoso. Speciale mi devas tie ĉi danki al esperantistoj el Krakovo

vo, kiuj post kelkaj meandroj flanke de Laika IKUE-Sekcio, reordigis la animzorgadon kaj favore de Kardinalo Francisko Macharski ricevis belegan preĝejon de Sankta Maria la Neĝa ĉe strato Mikołajska 21 por la ĉiumonataj Diservoj, kaj flanke de la Krakova Societo Esperanto kunvenejon ĉe la sama strato Mikołajska 2.

Fone de tio des pli strange sonas atentigo kontraŭ Esperanto flanke de la semajna revuo „Źródło” numero 17/19 2002, kies redaktejo situas ĉe la sama strato Mikołajska, kaj preskaŭ najbaras kun la katolika kunvenejo. En la 39a numero (el la 25a

de VIII 2002) ni legas longan artikolon kontraŭ Esperanto, el kiu mi citu: ...*valoras rimarki la duan vizaĝon de Esperanto, ĝian „sekretan”, malhelan flankon... Ĉu ne pli bona por reaktiri la fratecon estas plivastigo de latino — kies ekkono malfermus antaŭ ni verajn trezorojn de sankta liturgio, saĝeco de la malnovaj libroj kaj ekleziaj dokumentoj — ol komplete fremdan al nia religio, ne enradikigitan en la kristana kulturo — Esperanton?*

Kaj mi demandas: Ĉu ne estas tio ĉi la ignorantismo?

pastro Jozefo Zielonka



Je kio kredis L. L. Zamenhof?

Zamenhof estis eminentulo kaj ĉiu nacio volus nomi lin sia membro. Pologoj ofte parolas, ke li estis polo, kaj vere li estis judo; ke lia gepatra lingvo estis la pola, kaj vere liaj gepatraj lingvoj estis la rusa kaj la jida. Ankaŭ la religioj volas nomi lin sia membro. La katolikoj ofte fieras, ke li tre ŝatis katolikismon, ke en sia lernolibro de la internacia lingvo, sur la unuan lokon li metis *Preĝon de la Sinjoro* (el la Nova Testamento), kiel la fundamentan tekston de la nova lingvo, ke li verkis preĝon de tri grandaj religioj mo-

noteismaj (*Preĝo sub la verda standardo*), en kiu sur la unuan lokon li metis la kristanojn. Ili citas la vortojn: „*Se mi scius, ke iam Esperanto fariĝos la senidea movado, mi neniam verkus ĝin*”, interpretante ilin tiel, ke „senidea” signifas „ateisma”. Ĉu ili pravas?

La ideo de Esperanto estas ja tute malsama: „*Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas la lingvon Esperanto, tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Tamen la Esperantismo havas ankoraŭ flankon idean. Venos iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinte*

posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj Esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone, ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo estas — frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj. Tiu ĉi ideo akompanadis Esperantismon de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo”... Zamenhof klare diris, ke la E-ideo estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj, neniun religio.

Sed sian nacian kaj religian apartenon plej bone priskribis Zamenhof mem: „...*tiel same kiel mi en la nuna momento ne estas ia naciano, sed simpla homo, tiel same mi ankaŭ sentas, ke en tiu ĉi momento mi ne apartenas al ia nacia aŭ partia religio, sed mi estas nur homo*”. Do laŭ Zamenhof mem li estis nur homo, apartenanta al neniun nacio kaj neniun religio.

Ĉu tio signifas, ke Zamenhof estis ateisto? Ho, ne! Li kredis je Dio, sed akceptis neniun religion. Neniu religio estis por li tute bona, bela, senerara. Li sentis, ke mankas tia religio kaj ke li devas ĝin krei, kaj li tion faris. Li verkis du projektojn, hilelismon kaj homaranismon. Hilelismo celis transiri kaj neŭtraliigi religiajn barilojn inter homoj naskiĝintaj, kreskintaj kaj edukitaj en diversaj religiaj tradicioj. Baldaŭ Zamenhof reformis hilelismon kaj do-

nis al ĝi novan nomon, homaranismo. Homaranismo celis ne nur starigadon de la universala religietiko, sed ankaŭ politikan solvodon de etnaj problemoj direkte al humanisma kosmopolitismo. Li priskribis siajn religiojn per jenaj vortoj: „*La esenco de la veraj religiaj ordonoj kuŝas en la koro de ĉiu homo sub la formo de konscienco, kaj la ĉefa por ĉiuj deviga principo de tiuj ordonoj estas: agu kun aliuloj tiel, kiel vi dezirus, ke aliuloj agu kun vi; ĉion alian en la religio mi rigardas kiel aldonojn, kiuj, miksitaj kun legendoj, donis al ni diversegentaj instruintoj de la homaro, kaj kiel morojn, kiuj estas starigitaj de homoj kaj kies plenumado aŭ neplenumado dependas de nia volo*”.

Zamenhof ne estis ateisto, do li kredis je Dio. Sed kiel aspektis lia Dio? Li priskribis lin tiel: „*Ni (hilelistoj) sentas kaj agnoskas ekziston de la plej alta Forto, reganta la mondon, kaj tiun ĉi Forton ni nomas Dio*”. Fariĝi hilelisto povis ĉiu morala homo, en kiu ajn religio li estus edukita, eĉ ateisto, ĉar ankaŭ ateistoj ne malakceptas ekziston de ia nekomprenebla por nia menso tutmonda Forto. Zamenhof skribis, ke hilelisto-ateisto povas sub la vorto „Dio” kompreni fortojn de la naturo kaj mondan moralecon. Hilelistoj povis libere diskuti pri la esenco de Dio, pri moraleco, pri la esenco de vivo kaj morto. Zamenhof volis ankaŭ konstrui hilelistajn templojn. Laŭ li hilelistoj devus vizitadi templon tre ofte por aŭskulti la verkojn de la grandaj instruintoj de la homaro.

Vere Esperanto ne estis por Zamenhof la plej grava aĵo. Tiu estis liaj religioj. Tial en la 1912 jaro li rezignis pri la gvidanta rolo en E-movado kaj plene sin dediĉis al homaranismo. Li komencis tiam preparojn por la Unua Homaranista Kongreso en la neŭtrala Svislando, kiu bedaŭrinde pro la eksplodo de la Unua Mondmilito ne okazis. Malgraŭ tio Zamenhof ne senvolontiĝis kaj plu laboris, por ke lia projekto havu la plej ĝustan formon.

Sed lia religia projekto, kontraŭe al la lingva, ne sukcesis transvivi sian aŭtoron.

Nun pri hilelismo kaj homaranismo okupiĝas nur esperantistoj interesiĝantaj pri la E-historio. Multaj personoj opinias ilin tuta utopio. Tamen en interreto oni povas trovi kelkajn retpaĝojn kaj dissendolistojn pri ili. Ekzistas Hilelista Esperanto-Komunumo (HEK), retpaĝo: http://geocities.com/hilelista_komunumo, kaj Homaranisma Asocio Tutmonda (HAT), retpaĝo: <http://hat-esperanto.narod.ru/>. HEK eldonas trimonatan revueton „Hilelisto”, kaj HAT ĉiumonatan bultenon „Homarano”. Eble zamenhofaj religiaj projektoj estas pripensindaj kaj ni devas konatiĝi kun ili. Se ili ne interesos nin, ni almenaŭ pli bone ekkonos la historion de la vivo de la verkisto de tiom de ni ŝatata lingvo internacia. Li certe meritas, ke ni faru al li tiun malgrandan agrablajon.

Michael Müller

Scienca Revuo

Tiu riĉenhava revuo provizas ege interesajn artikolojn el diversaj domenoj kaj montras la evoluon de nia lingvo. Ĝi helpas pliriĉigi la vortprovizon de la leganto je vortoj, kiujn oni vane serĉus aliloke... Kvaronjara revuo. Abono por 2003: 49,50 zł. Eblas sendi ĝin al: Magdalena Tatara, 32-021 Koźmice Wielkie 323, k/Wieliczki, tel.(012) 451 11 39.

*informis: Maria Majerczak
Pola perantino de Internacia
Scienca Asocio Esperantista (ISAE)
tel. (012) 638 14 49.*

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino, aperas monate, eldonata en Kaliningrado, Ruslando. Unu el plej interesaj revuoj de nia Espernata komunumo. Abonebla kontraŭ 15 USD ĉe la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio, 44-101 Gliwice, skrytka 21.

Tornado

Monata, pollingva bulteno de junulara klubo „Varsovia Vento”, eldonata mimeografe, 10 n-rojn jare. Abonebla kontraŭ 40 zł. ĉe: Ireneusz Bobrzak, 03-226 Warszawa, str. Toruńska 82/133.

Dia Regno

Dumonata organo de Kristana Esperantista Ligo Internacia (protestanta). Abonebla kontraŭ 30 zł ĉe: Kazimierz Leja, 41-250 Czeladź, skr. poczt. 59 (NE sendu monon al la konto de la Eldonejo HEJME!).

Pola Esperantisto

Mi atentigas pri la nova banko-numero! Vidu la duan paĝon.

FORUMO POR FOR-EMAJ (kaj ne nur)

Esperantistoj partoprenante diversajn aranĝojn, babilante private „ĉe kafeo” demandas unu la alian pri „ĉi tio kaj tio”. Ofte estas diskutataj problemoj kiuj „vivas” inter ni de multaj jaroj. Ofte oni timas demandi pri io oficiale, laŭte. Estas temoj–tabuoj.

Tial ni proponas por ĉiuj, kiuj estas for–emaj kun siaj turmentantaj ilin demandoj skribi al tiu ĉi FORUMO. Ĝi estas loko por vi, por viaj demandoj, kiujn delonge vi volis starigi. Estu partoprenanto, ne for–emanto. Iu diris iam: „ne estas stultaj demandoj, estas nur stultaj respondoj”!!!

Persone mi volus scii la opinion de pola esperantistaro pri kelkaj problemoj, kun kiuj mi renkontiĝis dum mia esperanta vivo.

Unu el ili estas kunlaboro de esperantistoj (ĉu vere esperantistoj?) dum okdekaj jaroj kun „sekreta polico”. Mi persone estis kelkfoje alvokita al sekreta polico por „diskalkuliĝi” pro mia esperanta aktiveco. Oni eĉ por kelkaj monatoj prenis mian pasporton malfaciligante miajn preparojn por UK. Multfoje estis cenzuritaj miaj leteroj; mi eĉ sciis, kiu el esperantistoj kontrolis niajn leterojn en unu el sileziaj poŝtofiĉoj.

Ĉu iu el Vi spertis la samon? Ĉu polaj esperantistoj ne povus alskribi la novan ĉapitron por la libro „La danĝera Lingvo?” Ĉu inter ni ne estis

tiuj kunlaborantoj? Ĉu ili laŭ la komunisma sistemo agis leĝe? Ĉu...???

Alia problemo estas funkciado de PEA en okdekaj jaroj de pasinta jarcento. Estis bonegaj esperantistoj, estraranoj, gvidantoj de PEA, kiuj pro diversaj, ne komprenataj por ili agoj de „saniguloj” de PEA, devis foriri el la vicoj de la asocio. Ili ne propravole fariĝis „for–emaj” anoj.

Ĉu ne estas jam tempo por ilin oficiale rehabiliti? Ĉu unuavice oni ne devas peti pardonon de d-ro Jerzy LEYK, eksa prezidanto de PEA kaj de liaj kunlaborantoj? Ĉu ne estis honto, ke en Jubilea Jaro 1987 pola esperantistaro estis gvidata de komisara estraro? Ĉu inter niaj gekolegoj ne estas similaj eks–aktivuloj kiuj bezonas la same pardonigan peton? Ĉu...???

Mi atendas ĉiujn viajn sugestojn al tiu ĉi rubriko. Amike, via Drako

(Stanisław Mandrak)

Profitante la privilegion de la ĉefredaktoro mi direktu al la legantoj ankaŭ aliajn demandojn, taŭgajn por tiu ĉi Forumo. Kion vi opinias pri la baldaŭa referendumo pri Eŭropunuiĝo rilate al Zamenhofaj idealoj? Kiujn opiniojn kaj sugestojn vi havas pri la nuna stato kaj atendata revigliĝo de niaj E-organizoj? Kion vi opinias pri aliaj esperantistaj movadoj, konkurencaj al UEA, kiel ekz. Esperanta Civito? Eble ankaŭ vi havas proprajn demandojn? KL

Ago-Tago de Varsovia Vento

La 16an de februaro la klubo *Varsovia Vento* organizis la unuan ĉi-jare Ago-Tagon sur stratoj de Varsovio, en ĝia centra kaj historia parto, dum kelkaj horoj disdonante flugfoliojn kaj respondante al demandoj de la promenantoj pri Esperanto. La flugfolioj enhavis bazajn informojn pri valoreco de la lingvo internacia kaj gravajn montrilojn, kie oni povas trovi en la reto kaj en la realeco pli multe da informoj; la klubanoj posedis apartajn identifikilojn kun Esperanto-signo, nomo de la klubo kaj nomo de la aganto.

Dum la ago-tempo ni sukcesis interparoli kun 180 personojn disdonante saman kvanton de flugfolioj, kiujn ni transdonadis nur tiam, kiam iu pli longe ol nur momente reagis al demando — kion vi scias pri Esperanto? — kaj havis demandojn.



Sukceso de la unua Ago-Tago vekis entuziasmon inter la klubanoj. Unue, ĉar la promenantoj plejparte volonte babilis pri la problemo de la lingvo internacia, due ke helpis al ni preskaŭ printempe varma vetero en la ankoraŭ neĝkovrita urbo.

Similajn Ago-Tagojn la klubo planas organizi ĉiumonate, ekde majo preparonte ankaŭ ĉestratan ekspozicion de la libroj, lernolibroj, gazetoj kaj revuoj. Tio ĉio ligata estas en la klubo kun Ago-Semajno de Varsovia Vento (fine de la jaro en Zakopane), kiun ni komencis jam prilabori, kaj dum kiu ni informos pri Esperanto tutan semajnon en gaja etoso de la internacia rondo!

Raporto post la kluba Ago-Tago estis vere bone akceptita de la loka esperantistaro. Kelkaj membroj de la varsovia filio de PEA promesis eĉ ĉe la sekva okazo — tio estas en duono de marto — aktive partopreni nian ĉestratan informadon.

Ago-Tago estis financita de la klubanoj mem, kiu pagis por fotokopiado de la flugfolioj kaj por la kukoj kaj kafo jam poste, en la proksima de la agadloko kafejo.

Faru samon, kara samideano, kie ajn vi loĝas — ja neniam la tempo malfavoras!

Ireneusz Bobrzak
viavento@poczta.onet.pl

Kvankam multaj esperantistoj parolas pri totala krizo de Esperanto-agado en Pollando, de tempo al tempo ni povas aŭdi, ke estas lokoj, kie oni brave puŝas la aferojn antaŭen. Tio estas tiom pli ĝojiga, se temas pri la laboro farita inter infanoj kaj junularo. Sinjorino Leonia Wałczyk de multaj jaroj gvidas la infanan Esperanto-rondon en la baza lernejo en Pszczyna, silezia vojevodio, feliĉe tre sukcese. La infanoj volonte partoprenas sabatajn (!) renkontiĝojn, por kune lerni en amuza etoso. Lernas de tio ankaŭ iliaj parencoj, favore observas la aferon aliaj lernejoj instruistoj.

Por apogi pluan laboron de nia brava Kolegino, reagu per leteroj, gratuloj kaj salutvortoj, direktotaj al la lernejo (la adreso sube).

KL



Infana Esperanto-rondo el Pszczyna. Se vi volas trovi geamikojn skribu al nia adreso: Szkoła Podstawowa Nr 18, 43-200 Pszczyna, ul. Księżycowa 25.

Esperanta teatra sceno ARENO agas ĉe Urbocentra Kulturdomo en Krakovo ekde februaro 2001. Ĝi estas fondita pro bezonoj de krakova medio esperantista, inter alie Krakova Societo Esperanto, kaj interesiĝo de simpatiantoj de Esperanto. Iniciatinto kaj artgvidanto de ARENO estas konata profesia aktorino Jadwiga Gibczyńska, honora membro de UEA.

La nomo ARENO indikas diversecon de prezentado-formoj, kiuj sinsekve aperadas sur la scenejoj: programeroj teatraj, kant-muzikajoj, beletro proza kaj poezia, prelegoj kun lumbildoj kaj diversaj aliaj iniciatoj de kreivaj homoj. Krom lokaj esperantistoj prezentiĝas ankaŭ gastoj. En la spektakloj de ARENO partoprenas ankaŭ profesiaj aktoroj de krakovaj scenejoj, kantistoj, balet-dancistoj.

Noveco de ARENO-formulo konsistas en tio, ke la kontakto de aktoroj kun publiko okazas en du lingvoj, la pola kaj Esperanto, kio riĉigas la spektaklojn kaj igas ilin percepteblaj ankaŭ por neesperantistoj. Tiudirekte disvolviĝas la specifa stilo de ARENO, kiu esence estas servonta transdoni diversecon de kulturoj kaj strebas firmigi interhomajn rilatojn.

La spektakloj de ARENO okazas regule la unuan lundon de ĉiu monato (escepte someran libertempon julio-septembro) en Krakova Urbocentra Kulturdomo, str. Mikołajska 2 je la 18a horo.

Ĉirkaŭ la teatro, kiel informas Jadwiga Gibczyńska, fokusiĝas denove iamaj esperantistoj kaj tiuj, kiuj kreas jam Esperanto morta. Ankaŭ junuloj. La interesiĝo de krakovanoj pri la Teatro ARENO kreskas. La krakova Esperanto-scenejo proksimigas Esperanton al homoj en maniero natura kaj amika.

La plej proksimaj programeroj:

Aprilo la 7a: „La nigra kapo” laŭ Bolesław Leśmian (trad. Lidia Ligęza) — duodramo: Jadwiga Gibczyńska — Lidia Ligęza.

Majo la 5a: Sekva parto de prezentociklo Polaj laŭreatoj de Nobel-premio: omaĝe al Henryk Sienkiewicz premiito pri literaturo al QUO VADIS — „Sinjoro Henriko — en rememoroj de Helena Modrzejewska”. Fragmentojn el memuaroj de granda aktorino legas Jadwiga Gibczyńska.

Junio la 2a: „Gajaj ritmoj de muzikensemblo KAMEA” — gvidas Zbigniew Warmuz.

Kontakto kun la Teatro:
S-ino Jadwiga Gibczyńska
Os. 1000-lecia 7/89
PL 31-604 Kraków
e-poŝto: lameli.@lameli.com.pl



Kiam mi mem komencis lerni Esperanton, mi rimarkis, ke en mia loka movado preskaŭ oni ne vidas infanojn. Do mi klopodis informi ilin per diversaj manieroj pri Esperanto. Pri ĝia simpleco, kaj ĝenerale pri ĝia valoro kiel propedeŭtiko de fremdaj lingvoj. Jam instruante infanojn mi vidis, ke ili ne havis paciencon lerni tradicie — ili tuj volus vidi rezultojn. Sciante, ke infanoj volonte kantas, deklamas, desegnas, kolorigas ion, mi instruis ilin unue kanti. Komence simplan kanzonon laŭ konata melodio. Kantante, oni plej facile memoris vortojn, kaj poste mi tradukis detale tutan kanzonon.

Tiun metodon de instruado infanoj akceptis entuziasme. Do mi rekomendas tiun metodon al ĉiuj, kiuj ne kuraĝas instrui infanojn.

Teksto de jam konata kanzono estas ornamata per desegnoj kiujn faris infanoj, kaj ankaŭ mi aldonas vortaretojn kaj anguletojn kun „demando-respondoj”. Laŭ tiu maniero oni kreas „libretojn-helpiletojn”, kiuj samtempe servas kiel reklamo de Esperanto kaj antaŭ ĉio ili helpas memori ekkonitajn vortojn.

Mi estas konvinkita, ke kantitaj tekstoj plej bone „sidas en kapo”. Kompreneble, instruante, mi ankaŭ uzas lernolibrojn.

Bedaŭrinde (aŭ mirinde) oni ne sufiĉas nur instrui. Oni devas havi okazon prezenti sian lingvoscion, tio


estas plej bona ekzameno por junaj lernantoj.

Mi ĉiam invitas miajn infanojn al la Klubo, kiam okazas niaj esperantaj renkontiĝoj; tiam ili povas prezenti ilian scipovon.

Dank' al tiu laboro infanoj vidas, ke

Esperanto ekzistas kaj ili volonte plu lernas. Infanoj ege ŝatas ekskursi. Por ili estas bone aranĝi ekskurson al ekstero de la urbo, aŭ renkontiĝi kun infanaj E-grupoj.

Elżbieta Harężlak
Esperanto-Klubo „ESTI”




Knabineto sur ĉevaleto

Rajdu, rajdu ĉevaleto
rajdu, rajdu nun galop'
rajdu, rajdu, rajdu stop.

Kuru, kuru ĉevaleto
rajdu, rajdu knabineto
sur ĉevalo belaspekta
sidas belulin' perfekta.

kolorigu



Post detala vortareto sekvas demandoj kaj respondoj:

Demando:

1. Kiu sidas sur ĉevaleto?
2. Kiu rajdas?
3. Ĉu knabino estas bela?
4. Ĉu ĉevaleto kuras?

Respondo:

- Knabineto sidas sur ĉevaleto.
Knabineto rajdas.
Jes, knabineto estas bela.
Jes, ĉevaleto kuras.

„Pli proksimen al la mondo!”

„Blížej Świata” estas fremdlingva artkonkurso por gelernantoj de elementaj lernejoj kaj gimnazioj el la vojevodio Małopolska. Ĝi okazas unufoje jare en Elementa Lernejo n-ro 68 en Krakovo (str. Porzeczkowa 2, tel. (012) 633 32 09).

Jam tri jarojn Esperanto estas en ĝi reprezentata, sed nur de 2002 oficiale. Antaŭe E-programo aperadis eksterkonkurse, ĉar mankis konkurenco al la unusola kandidatiginta lernejo — Elementa Lernejo en Smardzowice (apud Ojców kaj Krakovo).

Tie Esperanton instruas Zofia Religa-Bieniek en la, de si fondita, lerneja Klubo de Juna Eŭropano. Ŝi malkovris la konkurson por esperantistoj kaj en 2002 tri lernejoj: du elementaj lernejoj el apudkrakovaj vilaĝoj kaj unu krakova gimnazio prezentis belan esperantan programon: kantojn kaj dancojn, poemojn de Mickiewicz kaj Zamenhof, fragmentojn de teatraĵoj de Ŝekspiro kaj Moliero. La konkurson partoprenis entute pli ol mil gelernantoj. La esperantlingvan parton gajnis gimnaziano reprezentanta sian lernejon.

Al pli bona lernejo — dank’ al Esperanto.

Dank’al tiu premio kaj ĉar la aranĝo estas altranga — vojevodia, la gajnintino ricevis kromajn 10 poentojn en

enirkonkurso al bona liceo (kun 10 kandidatoj je unu disponebla loko!), kiun ŝi elektis kaj — kontraŭe al aliaj gimnaziaj gekolegoj — estis akceptita. Televido Kraków, raportante pri la aranĝo, menciis Esperanton inter la 5 lingvoj de la konkurso (la aliaj estis: franca, angla, germana kaj rusa).

Zorgo de ni, la lokaj esperantistoj estas nun, ke la nombro de lernejoj prezentantaj esperantlingvan programon kresku.

La partoprenantaj infanoj ne devas lerni Esperanton lerneje aŭ scii ĝin; sufiĉas, ke ili scipovu prezenti en tiu lingvo poemojn, kantojn aŭ aliajn, laŭ sia elekto. Tiam ili povas reprezenti sian lernejon. Ili proponas tion al la lernejdirektoro, kiu aligas ilin al la konkurso. La partoprenon ne antaŭas lerneja aŭ media etapo.

La prezentotempo de la programo de unu infano estas maksimume 10 min., tiu de pliaj gelernantoj — maksimume 20 minutoj.

Valoras do, ke esperantistoj el Małopolska helpu infanojn prepari programetojn, kaj tiuj en aliaj vojevodioj serĉu: verŝajne ankaŭ en via regiono okazas similaj konkursoj, kie inter la „homaj lingvoj” mankas Esperanto... Se ne okazas, eble iu lernejo povus organizi tian aranĝon. Tiel ĝuste faris, antaŭ preskaŭ 10 jaroj, Elementa Lernejo n-ro 68 en la krakova, iom ekstera kvartalo, Witkowice.

Maria Majerczak
el „Ligilo” de Pola Sekcio de ILEI

LA DUA BALTA ESPERANTO-FORUMO

BALTA ESPERANTO-FORUMO estas tradiciĝanta esperantista renkontiĝo kun vasta programo. Ĝin iniciatis internacia revuo „La Ondo de Esperanto”. La unua Forumo okazis 14-18 jul 2002 en Kaliningrado – la ĉefa urbo de la plej okcidenta regiono de Ruslando – kun 123 aliĝintoj (el ili 113 reale partoprenis) el 12 landoj: Ĉeĥio, Danlando, Francio, Germanio, Italio, Litovio, Pollando, Ruslando, Slovakio, Svedio, Svislando, Ukrainio.

La dua Forumo okazos 17-22 de julio 2003 en Olsztyn (Olŝtin). Ĝin kunorganizas Varmia-Mazuria E-Societo kaj „La Ondo de Esperanto”.

Olsztyn situas en la nord-oriento de Pollando, duonvoje inter Varsovio (200 km) kaj Kaliningrado (150 km). Olsztyn (170 mil loĝantoj) estas la ĉefurbo de la regiono (vojevodio) Varmio kaj Mazurio. Ĝuste en ĉi tiu jaro oni solenos la 650-jariĝon de la urbaj rajtoj, kiujn Olsztyn ricevis en 1353.

La jubilea dato estos bona preteksto por konatiĝi kun la historie kaj arkitekture interesaj urbo kaj regiono. La programo enhavos temajn prelegojn kaj ekskursojn. Speciala seminario traktos la konsekvencojn de la aliĝo de Pollando kaj aliaj orienteŭropaj landoj al la Eŭropa Unio. Krome, ni denove diskutos la rolon de Esperanto kaj esperantistoj en la nuntempa mondo, kun speciala atento al Baltio.

SLAVAJ INFLUOJ EN ESPERANTO estas la ĉefa temo de la ampleksa kulturkleriga programo kun prelegoj pri la lingvaj, ideologiaj kaj kulturaj aspektoj de tiu temo. Interalie, oni aparte emfazos la centan datrevenon de la „Fundamenta Krestomatio” kaj la sepdek-kvian datrevenon de „La Tajdo” (Hohlov). Redakcianoj de „La Ondo de Esperanto” respondos demandojn de la legantoj. Eldonejo „Sezonoj” intencas en Olsztyn okazigi prezenton de la „Rusa Novelaro”. Partopreno de redakcianoj kaj kunlaborantoj de „La Ondo” kaj „Sezonoj” garantias altan nivelon de la prelegoj kaj seminarioj. Denove okazos serio da prezentiĝoj „Duonhoro kun...” kiujn

tre ŝatis la partoprenantoj de BEF-2002. Kvankam la programo celas esperanto-parolantojn, laŭnecese okazos paroliga kurso.

FREŜO estis en la 1990aj jaroj kvazaŭ vizitkarto de Olsztyn en Esperantujo. FREŜO „reviviĝos” kadre de BEF kiel serio de amuzaj vesperoj kun kvizoj en agrabla etoso. Funkcios libroservo, foiro de esperantaĵoj, fotoekspozicio kaj libera tribuno. Pliaj programeroj estas bonvenaj.

Internulejo de la Ekonomia Mezlernejo, kiu pitoreske situas proksime al du lagoj ekster la urbocentro, estos nia forumejo. La forumanoj povos loĝi en ĝi kaj manĝi en la lerneja manĝejo kontraŭ nur 10 eŭroj = 40 zlotoj tage. La tutforumo prezo: 50 eŭroj = 200 zlotoj. Oni povos loĝi en unu el la urbaj hoteloj. Prezoj varias inter 100 zlotoj (25 eŭroj) ĝis 350 zlotoj (90 eŭroj) por unu tagnokto kun matenmanĝo. Petu pliajn informojn ĉe la lokaj organizantoj.

Post la Forumo okazos por dezirantoj vizitado de Kaliningrado kaj konatiĝo kun vidindaĵoj de tiu unika regiono. Petu pliajn informojn kaj demandilon por ricevi ĝustatempe invitilon (ĝi estas bezonata por ricevi la vizon de Ruslando).

Pri la aliĝado, loĝado kaj aliaj surlokaĵoj skribu al la lokaj organizantoj:

Adreso: Marian Zdankowski, ul. Limanowskiego 36/3, PL 10-343 Olsztyn, Pollando.

tel.: 89-5347424, 89-5268702 (Marian Zdankowski); 89-5429972 (Elżbieta Frenszkowska). Poŝtel.: 0-604-071-141 (Marian Zdankowski).

rete: avo_lamer@labnet.pl
kaj: angiel@polbox.com

Pri la programo kaj Postforumo korespondu kun „La Ondo de Esperanto”:
RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248.

tel.: (0112) 566033 (ne frumatene)

rete: sezonoj@gazinter.net

Pliaj informoj pri BEF-2003 estas en la retpaĝaro de Sezonoj:

<<http://Esperanto.Org.Ondo>>

en la rubriko „Balta Esperanto-Forumo”.

Bonvenon!